

*Birdo de la Jaro***Venkis la tufgrebo**

Por la unua fojo la Asocio por Naturprotektado (*Nabu*) elektis akvobirdon: la tufgrebo podicipo kristata (*Podiceps cristatus*) fariĝis "Birdo de la Jaro 2001". Per tio oni volas atentigi pri la endanĝerigitaj akvoŭfluejoj kaj ties bestaro, komunikis vicprezidanto de *Nabu*, s-ro *Helmut Opitz*.

La ĉirkaŭ 50 centimetrojn granda tufgrebo apartenas al la plej signifaj germanaj akvobirdoj. Ĝin karakterizas la ruĝbrune kaj nigre kolorita plumkufo, brile blanka antaŭkolo kaj malhela pinta beko. Dum printempo resonas ĝiaj amludaj vokkrioj "kraorr" kaj "aorr" je la lagoj.

En Germanujo ekzistas, laŭ *Nabu*, ĉirkaŭ 32 000 kovad-paroj. Same kiel la plej multaj aliaj akvobirdoj ankaŭ la tufgrebo suferas de la homa "libertempociismo". Diras *Opitz*: "Ununura vel-tabulisto sufiĉas, forpeli en ĉirkaŭo de duona kilometro ĝis 90% de la tie ripozantaj akvobirdoj". Cento da birdoj plue kaptiĝas jaron post jaro en la retoj de fiŝistoj kaj dronas. (Fonto: *dpa*)

La germana esplorado tro fermita por reformoj

Laŭopinie de internacia ekspertkomisiono, la germana sciencsistemo ne estas sufiĉe malferma por novaj esplortemoj kaj estontecprovokoj. Subtenon per ŝtata mono trovas nur tio, kio dum daŭro de jaroj montriĝis taŭga kaj kio estas internacie agnoskita.

Tio estas la rezulto de reviziado de la du plej grandaj sciencorganizadoj, nome la Germana Esplorujo (DFG) kaj la *Max-Planck*-Asocio (MPG), kiun oni prezentis en *Bonn* al la Germanaj Federacio kaj Landoj. La du institucioj kune disponas pri jara buĝeto de preskaŭ du miliardoj da eŭroj.

La komisiono sub prezido de la Brita natursciencisto *Richard Brook* postulis de DFG, de MPG kaj de la Germanaj universitatoj, direkti la esplorlaborojn ankaŭ al novaj, estontecplenaj sciadprojektoj, forlasi la eluzitajn padojn, kaj evoluigi pli da kuraĝo kaj preteco ankaŭ por risko. Oni malfermu la reciprokajn rigidajn limojn kaj subtenu interdisciplinajn esplorlaborojn.

La ekspertistoj klare atestas al DFG, same al MPG, ke multaj el iliaj aktivadoj estas rigardataj modelaj. Okaze de DFG, kiu gravas kiel financisto de universitata esplorado, estas dirite ke ĝia aŭtonoma decidstrukturo kun memelektitaj ekspertizistkomisionoj estas laŭ kvalito absolute unika en internacia komparo. Sed tia strukturo favoradas jam establitajn esploristojn dum disdono de esplorrimedo.

Okaze de la *Max-Planck*-institutoj, kiuj estas la portantoj de la scienca fundamenta esplorado, estas dirite ke jam la nombro de ĝiaj Nobelpremi-

itoj atestas ĝian laborefikecon. Tamen, kaj la MPG-institutoj kaj la Germanaj universitatoj devas multe pli malfermi sin reciproke, unu al la alia. (Fonto: *dpa*)

25 landoj senarbaraj

La Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) admonas registarojn, pli bone zorgi por naturprotektado, ĉar laŭ UN-ekkonaj: en 25 landoj post dehakado fakte ne plu ekzistas arbaroj. Se la registaroj ne ŝanĝus sian respektivan politikon, tia detruo rapide daŭrus, raportas la UN-komisiono por Arbaroj kaj Longdaŭra Evoluo. La spertuloj sugestis la starigon de 'lokaj iniciativoj' kiuj prilaboru metodojn por pli efika arbarprotektado. Oni kuraĝigu registarojn kaj entreprenojn, fari pli multe por naturkonservado.

La komisiono kritikas, ke arbaroj ĝenerale estas rigardataj kiel nuraj "lignoliverantoj", sed ilia valoro por konservado de la klimato ne trovas sufiĉe da politika atento. (Fonto: *AP*)

La arbaroj de Bohemio plej grave damaĝitaj

La nord- kaj orient-bohemiaj arbaroj apartenas al la plej damaĝitaj en Eŭropo. Nur en Ukrainio la arbarmortado estas pli grava, citas la ĉeĥa ĵurnalo *Mladá Fronta Dnes* el komuna raporto de Eŭropa Unio kaj Unuiĝintaj Nacioj. Sole 12% de la koniferarabaro en Ĉeĥio estas sana. La ercmontaro (*Krusné hory*) kaj la orientbohemia Orlico-montaro (*Orlické hory*) estas en kriza situacio. Tiuj regionoj, daŭrigas la ĵurnalo, ankoraŭ ne resaniĝis de la forta frostperiodo de la vintro 1995/96 kaj de la venenaj substancoj el la proksimaj karbo-elektrocentraloj kaj ĥemiaj fabrikoj. (*dpa*)

En Berlino strikte malpermesita

Doni manĝaĵon al sovaĝaj porkoj en Berlino estas strikte malpermesite. Minacas alta punmono al personoj, kiuj nutraĵprovizas la hirtharajn bestojn. Pri tio atentigis la medioadministracio de la Berlina Senato. La plena kaŭzo por tiu iom ekzota punmona minaco: ĉian printempon malsataj aproj vizitas la periferion de la Germanuja ĉefurbo kaj avide serĉatakas rubosite- lojn kaj kompoŝtosaĵojn. (Fonto: *Main Post* 1999-04-17, p. J12)

Homoj provokas ŝarkdanĝeron

Neniam antaŭe ekzistis ŝarkproblemoj je la Brazilaj strandoj apud *Recife* - ĝis kiam estis konstruita nova haveno. De post septembro 1992 la rabofiŝoj atakis pli ol 20 homojn laŭlonge de marborda sektoro ĉirkaŭ dek kilometroj longa. Du surfantoj kaj kvar naĝantoj jam perdis pro tio siajn vivojn. La plej grava kaŭzo laŭ sciencistaj opinioj estas, ke la konstruado de la haveno detruis la vivomediojn de fiŝoj, kiuj servas kiel kaptaĵo por ŝarkoj. La fiŝoj formigris bangolfdirekten kaj la ŝarkoj sekvis ilin.

La Internacia Naturprotektada Unio (IUCN) akceptas tion kiel pluan subtenon por la tezo, ke estas la homo mem kiu provokas la danĝeron pro ŝarkĉeesto - ĉu kiel unuopula senzorga konduto, ĉu pro organizita homa enmiksiĝo en la naturon.

"Ŝarkatakoj estas preskaŭ ĉiam homkaŭzitaj" legiĝas en *Shark Info*, la ĵurnalo de la organizaĵo kun rezidejo en *Gland*, Svislando. Al IUCN apartenas 61 membroŝtatoj.

Kiel eltrovis sciencistoj la risko jam en multobla maniero plialtiĝis pro la havenkonstruado. Antaŭ ĉio, la loko nuntempe allogas pli da ŝipoj. Kaj kiam pligrandiĝas la ŝipa trafiko, ĉiam ankaŭ plialtiĝas la ŝarkatakoj. La kaŭzo estas ne nur la maren-jetitaj kuirejaj defalaĵoj, sed ankaŭ la elektromagnet-kampoj kaj prem-ondoj de boatoj kaj iliaj maŝinoj. Tiaj vibradoj - samkiel ilin estigas ankaŭ predobestoj kaj ĉirkaŭplaŭdantaj homoj - estas la plej grava orientilo por ŝarkoj. Ili havas por tio specialan organon, nome la flanklinian sistemon, kiu ilin fidinde gvidas al predo, eĉ en plej malklara akvo. (Fonto: *dpa*)

Plua planedossistemo

Usonaj astronomoj malkovris pluan planedossistemon en la universa spaco, kiu same kiel la Tero kaj ĝiaj najbaraj planedoj rivoluas ĉirkaŭ unu stelo. La sistemo konsistas el minimume tri steloj, kiuj rotacias ĉirkaŭ la stelo *Upsilon Andromedae*, proksimume 44 lumjarojn for de la Tero, raportas la Usona Astronomia Asocio. Ĉiu el tiaj tri planedoj estas pli granda aŭ preskaŭ tiom granda kiel Jupitero, la 'giganto' en nia sunsistemo.

(Fonto: *Main Post* 1999-04-17, p. J12)

Amazona fonto difinita

Dum ekzpedicio de *National Geographic Society*, teamo el kvin nacioj unuafoje ekzakte difinis la fonton de la rivero Amazono. Helpe de moderna navigacia teĥnologio la scienecistoj sukcesis, identigi riveron je pli ol 6000 m alta monto "*Nevado Mismi*" en suda Peruo kiel fonton. La ekzakta difino de la Amazona fonto estis ebla sole pro uzado de plej moderna nova satelitsistemo. (Fonto: *dpa*)

Ternuksoj ofte ŝarĝitaj

Laŭ ekzamenrezulto 1997 de nutraj-monitara grupo, ternuksoj ofte enhavas nedeziritan pezan metalon kadmion. La duono de ĉiuj specimenoj de rostitaj kaj salitaj ternuksoj transpasis la direktodonan limigon, ellaboritan por antaŭgarda konsumanta protektado. Oni plue ekzamenis la ternuksojn kontraŭ ŝimfunga veneno. La rezulto: en pli ol 80% de la eksperimentaj provoj la fungoveneno aflatoksino ne estis demonstrebla.

(Fonto: *Naturarzt* n-ro 7, 140a jarkolekto, julio 2000, p.46)

Nuksoj malplialtigas ĥolesterinon

Bonaj sciigoj por ĉiuj, kiuj ŝatas manĝi nuksojn, precipe juglandojn. Laŭ plej novaj ekzamenoj malplialtigas la juglandoj la ĥolesterinan nivelon, eĉ pli ol la multe gloriita olivoleo. Tiu surpriza rezulto venas de hispanaj kuracistoj. En respektiva studo partoprenis viroj kaj virinoj kun plialtiĝintaj ĥolesterinaj kaj trigliceridaj niveloj.

La ekzamenitoj ricevis aŭ tipan mediteranean manĝaĵon kun olivoleo (sed sen nuksoj) aŭ striktan juglando-dieton. Ĉe tiu lasta, parto de la olivoleo kaj aliaj nesaturitaj grasaj acidoj estis anstataŭataj per 41 ĝis 56 gramoj da juglandoj (8 - 11 juglandoj/tage). La ekzamenrezulto: ĥolesterinaj triglicerid-proporcioj malplialtiĝis ĉe la juglando-dieto pli signife ol ĉe mediteranea manĝaĵo. (Fonto: *Naturarzt* n-ro 11, 140-a jarkolekto, nov. 2000, paĝo 44)

Mediterranea nutraĵo kontraŭ artrozo

Esploristoj jam delonge provis eltrovi, ĉu la mediterranea manĝaĵo influas la reŭmatisman artrozon. Ŝajnas ke olivoleo kaj freŝaj legomoj protektas kontraŭ malsanoj de la artikoj kaj mildigas ties simptomoj. Grekaj sciencistoj de universitato Ateno nun malkovris, ke la evoluo de la malsano estas intime ligita kun la nutrado. Pacientoj el ekzamengrupo, kiuj uzis nur malmulte da olivoleo en la nutraĵpreparo montris 2½-oble pli altan riskon, malsaniĝi pro reŭmatisma artrozo. Tiuj, kiuj manĝis plej ofte legomojn, malplialtigis la malsanoriskon je 75 procentoj.

(Fonto: *Naturarzt* n-ro 7, 140a jarkolekto, julio 2000, p. 46)

Muzikpremio "Sciencaj Eldonoj"

La Mozartaj Skizoj

La eldono de la skizoj de *Wolfgang Amadeus MOZART*, prezentita de la muziksciencisto *Prof. Dr. Ulrich KONRAD* de la universitato *Würzburg* estis distingita en la kategorio "Sciencaj Eldonoj" per la Germana Muzikeldon-Premio de la jaro 1998. La eldonaĵo aperis en grandvolumena kasedo kaj entenas la multkolorajn faksimilojn de la entute cent postlasitaj skizfolioj de Mozarto de la jaroj 1769 ĝis 1791, la transskribon de la ofte nur malfacile deĉifreblaj notoj, kaj akompanan libreton kun kritika raporto kaj diversaj indeksoj.

Ek de la pasinta jaro, do, per tiu eldono estas havebla - por la unua fojo en la historio de la Mozartesplorado - la kompleta ĝis nun konata skizaro de la komponisto. La Germana Muzikeldonista Asocio, kiu disdonas tiun premion, aprezis - krom la elstaran publikigon - la por muzikscienco "novstilan kaj por la estonteco valorgradigan eldonaranĝon". Ĝi speciale distingigas pro tio, ke la genetikaj ŝtupoj de la manuskriptoj prezentigas plurkolorajn en la transskribadoj, kaj tiel komunikas analitikan aliron al la verkadmaniero de Mozarto.

(Fonto: *Main Post* n-ro 91, 1999-04-21, p.15)